

64-a jaro n-ro 179 2023:1

**la** lampiro



# **Minimumismo - La gôjo de malplio**



# Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO  
MIA AMIKO**



**[pma.esperanto.org.br](http://pma.esperanto.org.br)**

# Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**  
Espere kaj labore
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**  
Sidejo remalfermita
- 6 | **Iom da Historio**  
Anakaona - Virino kiu iĝis  
nacia heroo
- 9 | **Kino kaj aliaj artoj**  
La tri Kristoj
- 10 | **kovrilartikolo**  
Minimumismo - La ĝojo de malpio
- 14 | **Lingva angulo**  
Mil tondroj!
- 16 | **Por via medito**  
Hejmbestoj kaj homa mensa sano:  
Ĉu ekzistas rilato?
- 20 | **Opiniangulo**  
Revoj, vojoj al realeco!
- 22 | **Iom da poezio**  
La horloĝo
- 23 | **Universala Literaturo**  
"La Ondo de Esperanto"  
relanĉas "Kandidon"
- 24 | **Recenzo**  
La Pirata Insulo
- 26 | **El mia ĉiutaga vivo**  
Paca arto
- 29 | **Iom da Literaturo**  
Gaŭĉa Literaturo
- 30 | **Iom da Gramatiko**  
Lingva Angulo de  
Francisco S. Welchsler

la lampiro

64-a jaro n-ro 179 2023:1

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
(psviana@terra.com.br)

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima  
**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf  
**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** José R. Tenorio da Silvas

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2023

Simple Membro .....	R\$ 200,00
Subtena Membro .....	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro .....	R\$ 100,00

## Multjara tradicio

Jen Novjaro, jen nova numero de nia Lampiro, kune kun renovigita entuziasmo pro la fino de katastrofa pandemio. Iom post iom, EASP klopodas reveni al ĉeestaj kunsidoj, kie eblas brakumi la gesamideanojn, kafumi kune kaj babili ĝoje. Mi esperas, ke niaj karaj legantoj, en kaj ekster la kadro de EASP, vikle ĝuu la (re)novan vivon.

En ĉi tiu numero vi povos legi plej variajn tekstojn, pri kiuj mi ŝatus ricevi viajn impresojn. Kion vi plej volonte trovas en niaj paĝoj? Ĉu La Lampiro kontentigas vian bezonon pri agrabla,

malbanala, kulturriĉa materialo en Esperanto? Ĉu vi preferas tekstojn pri scienco? pri literaturo? pri poezio? pri nia movado? pri lingvaj instruoj?

Kompreneble, ni ĉiam ripetas la inviton, ke ankaŭ vi, kara leganto, kontribuu per viaj verkoj, ĉu tradukaj, ĉu originalaj. La Lampiro volas nur plu daŭrigi la multjaran tradicion provizi legaĵojn, kiuj pensigas kaj klerigas, en agrabla, malpeza stilo. Esperanto ne estas nur lingvo, sed kultura fenomeno en nia mondo soifanta pacon kaj solidarecon.

**Paulo Sergio Viana**



*(Re)aniĝu por 2023!*

## Sidejo remalfermita

Saluton al ĉiuj gelegantoj.

Kun granda plezuro mi diras al vi, ke nia EASP revenas, malrapide sed firme. Ni havas multajn kunlaborantojn, kiuj planas diversajn agadojn, kiel promenojn, tomboludojn, ĉeestajn kunsidojn, programerojn kun la gejunuloj.



En ĉi tiu komenciĝanta jaro 2023, via partopreno estas grava por plifortigi en ĉia maniero nian movadon, favore al nia afero. Ni memoru, ke la lingvo estis farita por interkompreniĝo meze de diverseco, ĉu pri religiaj, sociaj, individuaj malsamecoj.

La lingvo Esperanto estas fakte kulturmovado, kiu instigas al persona pliboniĝo kaj agado de solidareco. Mi invitas vin ĉiujn plu partopreni ankaŭ en niaj interretaj iniciatoj, en jutubo kaj en virtualaj kunsidoj sub la aŭspicio de EASP.

Per unuiĝo kaj harmonio ni laboru plu. EASP dankas vin pro via aktiva partopreno.

**Esmeraldo Aparecido de Alencar**

<https://easp.org.br/asocio/#filiacao>





## Anakaona - Virino kiu iĝis nacia heroo

Tre malofte oni trovas en la historiaj libroj biografiojn de venkitoj kaj de virinoj. Kompreneble, ankoraŭ pli raraj estas rakontoj pri faroj de virinoj de konkeritaj popoloj.

Tamen en la lastaj jardekoj kreskas tendenco al reviziado de la homa historio, surbaze de dokumentoj intence aŭ ne

intence neglektitaj, kaj unu el la rezultoj de tiu esplorado estas la emerĝo de homoj, kies heroaĵoj restis longatempe ne sufiĉe konataj aŭ kaŝitaj pro fiaj intereso.

En la 16<sup>a</sup> jarcento de nia kalendaro, unu el tiuj homoj vivis mallongan vivon en la mondoparto nune konata kiel Centra Ameriko. Ŝi estis virino bela kaj potenca, kies nomo – Anakaona – signifis “ora floro”.

Anakaona estis ano de la popolo taino, kiu dum jarcentoj loĝis en la insuloj Antiloj, ĉe la Kariba Maro. Ŝi naskiĝis en la plej granda insulo de tiu regiono, nomita de la hispanaj navigantoj “Santo Domingo” aŭ “Hispaniola”, en ties parto kie nun situas Haitio. Kiam la hispanoj alvenis, ŝia frato, Bohechio, estis unu el la lokaj ĉefoj kaj ŝi estis edzino de alia tribestro, Kaonabo.

Post la unua kontakto kun la tainoj, Kristoforo Kolumbo skribis al la his-





pana reĝo, dirante ke ili estas noblaj, ĝentilaj, ridemaj, ke inter ili ne okazas murdoj kaj raboj. “Eble Via Reĝa Moŝto ne kredos, tamen mi asertas, ke ne estas en la mondo pli bonaj homoj... Ili amas siajn najbarojn kiel sin mem, ilia parolo estas la plej dolĉa en la planedo.”

Malgraŭ tio, en sia dua vojaĝo, Kolumbo komencis postuli tributojn de la tainoj. Ĉiu ano de tiu popolo estis devigata liveri manplenon da oro je ĉiu tria monato aŭ, se mankus oro, 25 kilogramojn da kotono. La hispanoj tranĉis la manojn de tiuj, kiuj ne pagis, kaj lasis ilin sangantaj ĝismorte. Tiuj kruelaĵoj estigis multajn ribelojn de la tainoj kontraŭ siaj opresantoj.

Dum unu el tiuj ribeloj, Kaonabo, estro de la regiono Maguana, edzo de Anakaona, estis kaptita kaj sendita al Hispanujo, sub akuzo de organizado de atako al la kolonio. Li pereis en ŝipdrono, en 1496. Anakaona anstataŭis lin. Ŝia frato Bohechio mortis ses jarojn poste kaj ŝi devis anstataŭi ankaŭ lin kiel estro de la regiono Jaragua. Tiel Anakaona iĝis la unua virino estranta du tribojn.

En la bataloj de malgrandaj grupoj de indiĝenoj kontraŭ la hispanoj, ĉi tiuj preskaŭ ĉiam havis avantaĝon, ĉar ilia armilaro estis pli potenca. Anakaona

komprenis do, ke la nura ebleco eviti kompletan pereon de ŝia popolo kaj konvinki la eŭropanojn pri paciĝo estis kunigi la tribojn. Kaj ŝi komencis agi por tio.

Tamen la hispanaj konkerintoj vidis ŝin kiel minacon kaj ne volis paciĝon. En la jaro 1503, la guberniestro Nikolao de Ovando sendis kurieron por diri al Anakaona, ke li intencas viziti ŝin amikece. Ŝi ne suspektis pri lia abomena plano.

Li alvenis, en julia dimanĉo, kun centoj da viroj, multaj el ili sur ĉevaloj, kaj estis akceptita kun festoj, kan-



toj kaj dancoj, laŭ la moroj de la indiĝenoj. Ĉeestis ankaŭ dekoj da kacikoj, regatoj de Anakaona.

Iumomente, la omaĝatoj invitis la indiĝenojn kunsidi en kabano, prete-kstante prezenti siafoje spektaklon al ili. La kacikoj kaj iliaj akompanantoj, nearmitaj, entuziasme eniris en la kabanon.

Tiam Ovando signalis kaj liaj komandatoj katenis ilin en la kabano kaj bruligis ĝin. Dume aliaj hispanoj atakis kaj murdis la indiĝenojn, kiuj restis ekstere, eĉ virinojn kaj infanojn.

La destino de Anakaona estis mortkondamno pro perfido. Ŝi estis pendumita en la urbo Santo Domingo.

Anakaona, la “ora floro”, vivis nur 29 jarojn. Dum jarcentoj ŝia nomo ne aperis en la historiaj libroj, sed iel ŝia memoro supervivis, persistis tra la tempo kaj forte vivas en la animoj de ŝiaj posteuloj kaj ĝenerale en la kolektiva animo de Haitio, kiel neforgesebla simbolo de luktado por digno kaj libereco.

**José Mauro Progiante**



La masakro de reĝino Anacaona kaj ŝiaj regatoj.  
Kuprogravuro verŝajne de Jodocus van Winghe, publikigita en 1598.



# La Tri Kristoj

*Originala nomo: Three Christs*

*Direktoro: Jon Avnet*

*Aktoroj: Richard Gere, Peter Dinklage,  
Walton Goggins*

*Lando: Usono, 2020*

*Tempo: 1h 45m*



Mi aparte havas intereson pri Psikologio. Kaj estas tre interese vidi kiel la historio pri kiel trakti mensan malsanon disvolviĝis. Ĝi ne ĉiam estis bela. Male, ĝi estis plena je ŝokoj, malbonaĵoj, kuraciloj, kaŝigoj kaj katenigaj ĉemizoj. Eĉ nuntempe ĝi ne perfektas. Restas multe por malkovri kaj scii pri tiu ĉi kampo.

Tiu ĉi filmo estas ja inspirita sur vera fakto, kiu okazis en Usono, je la 1950-aj jaroj al la psikologo Milton Koreach. Tiam, la maniero trakti tiajn pacientojn estis limigita, kun multaj cerbaj ŝokoj kaj kvietigaj kuraciloj.

Rimarkinte ke tri pacientoj de la malsanulejo kredis sin ia reenkarniĝo de Jesuo Kristo, la psikologo decidis flegi tiujn tri. Kaj li devis esti kuraĝa por alfronti la manieron, kiel tiu kampo de laboro funkciis tiam, kaj proponi ion novan.

La ideo simplas – organizi ĉiutagaĵojn de la pacientoj por ke ili estu ĉiam kune kaj ke ili estu preskaŭ devigataj babili kaj komunikiĝi. Kio rezultis tre pozitive por ili. Kaj same por la psikologo, kiu multon lernis.

Ĉe la filmo, oni ŝanĝis la nomon de la psikologo al Alan Stone, sed la kerno de la historio restas. Kaj ĝi estas brile filmita kaj aktoroj estas tre bonaj je siaj roloj – speciale Peter Dinklage kiel Joseph.

Malgraŭ etaj malsamecoj, tiu historio ankaŭ memorigas min pri la brazilanino Nise da Silveira. Mi ankaŭ komentis filmon pri ŝia vivo antaŭe. Oni staru por defendi la rajtojn de tiuj kiuj bezonas, ĉu ne? Oni spektu tiujn filmojn por konsciiĝi pri la kontraŭazila batalo. Oni ne lasu ke tio okazu denove.

**Anna Lobo de Carvalho**

# Minimumismo - La ĝojo de malplio

Retejo kun la nomo *The Simplify Daily* (libere tradukebla kiel "La Ĵurnalo de Simpligo") traktas pri solvoj al la homa fenomeno amasigi kaj konservi tion, kio (ne ĉiam) necesas por maksimuma kontentigo de vivbezonoj kaj (rido)j tiel konkeri la feliĉon.

La daŭra akumulado verŝajne fontas el nia praulara bezono senĉese ĉasi kaj rikolti, kun la timo pri mankoj, kiuj malhelpas la konservadon de nia specio. Ne temas pri akumulado laŭ kiu iuj homoj kun mensaj problemoj transformas sian ĝardenon en filion de la urba forĵetejo. En ni ĉiuj kun (relative) funkcia menso estas diversgrada akumulemo, pro la instinkta sento pri memkonservado, kiun cetere ĉiu specio havas en sia interna "programo", nome arigi la maksimumajn rimedojn por tiu celo, "la fina venko".

Tiam venis la strategio de niaj praprapraavoj, disvolvita tra plurdekmiloj da jaroj: stoki nutraĵojn (sub ŝtonoj, en

truoj, en kavernoj, en domoj, en insilujoj, en siloj) por la momentoj kiam la sezono malfavoros plukadon kaj ĉasadon. Per tio la nomadaj prahomoj povis pli longan tempon resti en unu sola loko. Tio ebligis la estiĝon de agrikulturo (kun antaŭvidebleco de nutraĵoj), la fondon de estontaj urboj, kulturo kaj la disvolvon de tutaj civilizacioj ĝis la komputilo per kiu mi verkas tiun ĉi artikolon. En tiu lasta frazo pasis relative mallonga tempo por la universo, nur 12 mil jaroj. Nia juna Tero havas 4,6 miliardojn da jaroj, do la tuta historio de la homa agrikulturo kaj civilizacioj konsistigas verŝajne nur 0,00027% de la aĝo de nia planedo; en ĝi ekzistas vivantaĵoj, laŭ la studoj de fosiliaj konserviĵoj, ekde 3,5 miliardoj da jaroj, do dum tri kvaronoj (75%) de la aĝo de la Tero.

Memkomprenebla estas la koncepto de triumfo de nia specio tute bazita sur la ideo de akumulado, konservi nun por uzi poste, kio estas racia kaj nepra viv-maniero – ĝis kiam la



akumulaĵo (multe) superas la nepraĵon. La malegaleco de akumulado en la mondo estas tia, ke duono de la plej malriĉa loĝantaro kune havas nur 2% de la mondaj riĉaĵoj. La proporcioj varias laŭ kontinento, sed tutmonde la 10% plej riĉaj kune posedas 78% de la mondaj riĉaĵoj kaj la 1% plej riĉa posedas 50% de la riĉaĵoj. Kulmine, la 60 plej riĉaj homoj havas la samon kiel 3,6 miliardoj da malriĉuloj, laŭ la lastjara studo de la skipo de Thomas Piketty en la *Ekonomi-lernejo de Parizo*.

Por reveni al nia sfero de hejma vivo, kie akumulado komenciĝas en la unu-opaj "ĉeloj" de la homa socio, la ne-identigita aŭtorino en *The Simplify Daily* aludas al la pretigo de valizoj (io kara al ni, moviĝemaj esperantistoj). Ĉu vi ne havas la impreson, ke mankos io dum vojaĝo kaj ke neniu valizo estas sufiĉe vasta? Ĉu ne estas preskaŭ ne-rezistebla kaj universala emo enmeti ion plian en la valizon, ĝis kiam ĝi estas apenaŭ fermebla (aŭ la tolerata pezolimo)?

Tiel ni povas kompari nian vivon kaj domon. Ĉu ni ne volas "troplenigi la valizon"? Kial? Laŭ la aŭtorino plu pelas nin la prapatra timo pri manko. Kion tiu timo kaŭzas kun amasigemo? La angoron, ke ni iam ne havos sufiĉon

por nia sekureco, ke ni perdos memorojn pri niaj iamaj karuloj kaj pri nia pasinteco, kaj speciale ĝi kaŭzas nekonscian egoisman sintenon rilate al la proksimuloj – ni preferas teni neuzataj (tamen teni) aĵojn, kiuj povus utili kaj mankas al alia homo. Ĉu ni ne havas tro da superfluaĵoj? Tio cetere rekte rilatas kaj al troa konsumemo kaj al konsekvenca troekspluatado de naturaj rimedoj, kun tuja aŭ estonta produktado de forĵetaĵoj. En mondo (kaj lando) kie homoj ne sukcesas atingi tri manĝojn tage, ni vivas en konsum-socio, kiu dronigas nin (kaj la senmanĝajn) en psikologiaj kaj ekonomiaj instigoj kiel "havu!", "havu la novan", "havu pli rapidan", "anstataŭigu per pli granda" k.s..

La konscio pri tio kondukas al la t.n. "minimumismo", strebo por kompreni kion ni efektive bezonas kaj havi tiom sufiĉe. La plej multaj inter ni eble havas malfacilecon en la kompreno de kiom multe estas "la sufiĉo". Bonŝance ekzistas ekzercoj por provi la limojn kaj tion malkovri kaj okaze de troigoj eblas retroiri, sen pli



grandaj konsekvencoj. Ne saman ŝancon havas tiuj, kies domoj estas trafitaj de inundo, disfalo, tertremo.

La aŭtorino proponas simplajn praktikajn eksperimentojn por ekkonscii pri sufiĉo, inter kiuj elstaras kvin:

1) Enskatoligu duonon de viaj teleroj, kaseroloj kaj utilaĵoj de via kuirejo dum almenaŭ unu monato.

Post tiu tempo kontrolu:

1. ĉu la bretoj kaj ŝrankoj estas pli liberaj kaj puraj?
2. ĉu via tablo aŭ similaj surfacoj estas pli liberaj por fari kuirajn taskojn?
3. ĉu vi ankoraŭ sukcesas prepari la ĉiutagajn manĝojn?
4. kiom da fojoj vi vere bezonis aliri la skatolon, en eventuala speciala okazo? Aŭ ĉu vi tute ne aliris kaj jam povas fordoni la plej grandan parton de tiu skatolo?

En tiu ĉi punkto, de alia aŭtoro mi legis sugeston por kuirejaj tirkesto: apartigu manĝilarojn kaj ĉion similan, kiu vivas en kuireja tirkesto. En unu tirkesto koncentriĝu ĉio, kion vi kredas ĉiutage uzata. En dua tirkesto, ĉio kion vi opinias foje uzata. En la tria ĉio, kion vi konscias neniam uzi (kaj en rubujon ĵetu tion, kio eĉ ne estas donacebla). Post unu monato kalkulu kiom da fojoj vi malfermis la trian tirkeston – ĉu neniam? Jen kandidatoj al donaco al

bezonanta familio aŭ institucioj kun bonfaraj foiroj. Kiom da fojoj vi malfermis la duan tirkeston? Ĉu en ĝi eble estas kandidatoj por verŝi al la tria tirkesto?

2) Enskatoligu duonon de viaj vestaĵoj, ŝuoj, mansakoj/dorsosakoj, ŝmin-kaĵoj k.s. dum almenaŭ unu monato. Post tiu tempo kontrolu:

1. ĉu vi ankoraŭ vin vestas kaj taŭge zorgas pri vi?
2. ĉu via banejo estis pli facile purigebla kaj ordigita?
3. ĉu vi havis malfacilaĵojn por aranĝi vin aŭ tio estis solvebla per kreiveco?
4. ĉu vi sentis streson pri kio vesti ĉiutage?
5. ĉu estis konsekvencoj en la purigo de vestaĵoj?
6. ĉu mankis io aŭ ĉu vi jam povas fordoni la plej grandan parton de tiu skatolo?

3) Enskatoligu duonon de viaj ornamaĵoj, ornamaĵetoj kaj pentraĵoj same dum almenaŭ unu monato. Post tiu tempo kontrolu:

1. ĉu via domo aspektas tro senkolora aŭ estas bone ornamita?
2. ĉu vi pli atentis pri la videblaj aĵoj ol antaŭe, kun troplenaj bretoj?
3. ĉu vi rimarkis diferencon en la pli facila forigo de polvo?



4. ĉu mankis io aŭ ĉu vi jam povas fordoni la plej grandan parton de tiu skatolo?

4) Se vi havas infanojn, enskatoligu duonon de la ludiloj de viaj gefiloj dum almenaŭ unu monato.


Post tiu tempo kontrolu:

1. ĉu ili plu distras sin?
2. kiel la malpli granda disponeblo de ludiloj influis ilian kreivecon ludi kaj improvizi ludilojn?
3. ĉu ŝanĝiĝis la malordo kaj streĉnivelo en la domo?
4. ĉu ili vere sentis la mankon de io aŭ ili povas ekzerci sin pri la donacemo al senludilaj infanoj?

5) Forigu meblon (fotelon, kiun neniu uzas, ŝrankon kun negravaĵoj, apudtablon, kiu estas ofta malordejo ktp.). Post tiu tempo kontrolu, ĉu mankis al vi la meblo (kaj ĝia enhavo) aŭ per la gajnita spaco via domo fariĝis pli alirebla, pli facile purigebla, kun spaco por planto ktp.

Oni povas provi tiujn sugestojn kaj konstati, ke eblas komforte vivi per malpli. Tio povas esti liberiga sperto kaj neeviteble ekhavi pli da tempo por atenti pri vere gravaj aferoj. Kial ne provi?

**James Rezende Piton**



# Mil tondroj!

La figuro de la franco Carlo Bourlet (1866-1913) ĉiam inspiris kaj impresis min, ankaŭ lia verkostilo. Sur muron de mia hejma laborĉambreto mi fiksas unu lian frazon, kiun mi prenas por devizo: *Moviĝante, ni pruvu la eblecon de l' movo!* Pri li oni jam multe kaj plurloke artikolis, kaj mi ne deziras rediri konatajn faktojn. En la retejo La Ondo de Esperanto (sezonoj.ru) vi trovos historiajn informojn pri lia esperantistiĝo, pri lia elstara agado por la fruaj Universalaj Kongresoj, pri lia tragika forpaso ĝuste kiam li estis organizanta la poste nuligitan parizan kongreson el 1914, kiu estas ankoraŭ unu el la kongresoj kun plejmultaj aliĝintoj (3739). Krom tio, vi legos tion, kion pri li parolis Zamenhof mem okaze de lia entombigo.

Bourlet fondis kaj direktis La Revuon, “la unuan veran literaturan gazeton en Esperanto”, laŭ artikolo de Halina Gorecka (La Ondo, n-ro 4, 2009). En ĝi aperis iam kaj iam liaj *Babiladoj*, artikoloj pri ekzemple movadaj temoj. Ismael Gomes Braga kompilis kelkajn


el ili kaj Brazila Spiritisma Federacio ilin publikigis en 1940 kaj 1987 sub la titolo “Monumento de Carlo Burlet”, kiel legolibron por lernantoj de Esperanto.

Antaŭ nelonge releginte la libron esplorcele, mi ekpensis, ke voloras kolekti kelkajn interesajn esprimojn en artikolojn (indiko de paĝoj el la dua eldono el 1987). Jen ili:


1. ...ke ni devas resti kun krucitaj brakoj, nenion farante... (p. 24)
2. ...pli bone malfrue, ol neniam. (p. 27)
3. Al ĉiu sia rolo... (p. 28)
4. (S-ro *Piery*) kun mirinda virtuozece tiris nin al ekstazo. (p. 31)
5. ...ili ankaŭ ricevis la tre interesan kaj dokumentozan raporton... (p. 32)
6. Mi eksaltis. (p. 35)
7. Ĝi estas te-kaj ĉokoladvendejo... (p. 36)



8. ...leĝo pri la plej malgranda peno... (p. 37)
9. La unuan fojon la aŭdantaro ridis, la duan fojon ĝi ridegis, la dekan fojon ĝi tordiĝis. (p. 37)
10. Kia superbela eldono! (p. 47)
11. ...idealisto en la plej alta senco de tiu vorto... (p. 53)
12. Kaj mi cetere, sen ruĝo sur la vango, volonte konfesas... (p. 56)
13. Mil tondroj! La poŝtisto parolis Esperanton. Mi estis savita. (p. 64)
14. ...diferenco tiel maldika, kiel haro. (p. 75)
15. Eble iu diros, ke mi ĉiam remaĉas la samajn rakontojn. (p. 86)




Carlo Bourlet  
(1866-1913)



Jen la numeroj de La revuo:  
Esperantomuzeo kaj Kolekto  
por Planlingvoj

<https://mallonge.net/larevuo>

**Leandro Abrahão**



## Hejmaj bestoj kaj homa mensa sano: Ĉu ekzistas rilato?

La Esperanta Klubo de Pasargada ĉiam donas al ni bonan momenton, unufoje monate eblas kunvivadi, kaj ricevi vizitantojn, kiuj venas por prelegi pri allogaj temoj.

Certe vi jam legis, en la lasta numero de ĉi tiu revuo, la prelegon de samideano Blanketo, kiu multe plaĉis al mi. Sed nun mi volas prezenti al karaj legantoj iom de la prelego farita de samideanino Aline.

Ŝi venis iom pli frue, kaj kumportis belan hundeton, nomatan Pitiko. Ĝi estas malgranda, blanka, kaj preskaŭ ne bojas. Akvon, kaj iom por manĝi ŝi donis al ĝi. Dum la tuta tempo de la prelego, ĝi restis proksime, atente rigardante la mastrinon, Aline. Vere, la hundido ĉarmis ĉiujn per sia beleco kaj trankvila rigardo.

Do, mi petas vin, kara leganto, diveni la temon de la prelego. Ĉu vi jam imagis? Kiu atentis pri la hundeto, kaj la zorgo de Aline, jam komprenis. Jes,

ŝi venis por paroli al ni pri la hejmaj bestoj kaj iliaj influoj sur nia sano.

La unua demando estis por scii kiu, inter ni, jam havas hejmajn bestojn? Kaj surprize, preskaŭ ĉiuj havas aŭ havis unu besteton hejme. Ŝajnis magia demando, la ĉeestantoj komencis paroli pri siaj bestoj, katoj, hundetoj, birdetoj, kunikloj kaj testudoj, kaj multaj aliaj.

Samideanino Julia, kiu havas unu papagon, diris laŭte: Miaj karaj, ĉu vi scias ke la papagoj jam forĵetis la fifamon de imitantoj? Sciencistoj jam rekonas, ke la inteligenteco de ĉi tiuj birdoj estas komparebla al tiu de del-fenoj kaj ĉimpanzoj.

Post unu aŭ du minutoj, la silento revenis, kaj ridetante ŝi rekomencis paroli.

— Jes miaj karaj. Tiaj hejmaj bestoj nuntempe estas pli kaj pli grand-nombra, precipe en tiaj domoj kie la


paro ne havas filojn, kaj pro tio la amataj bestetoj vivas kiel ano de la familio. Antaŭ ne multe da tempo, eĉ la Papo Francisko kritikis la sintenon de tiaj geedzoj kiu ne volas havi filojn sed nur hejmajn bestojn.

En ĉi tiu momento, la maljuna samideanino Estela petis permeson kaj demandis: — Mi volas scii kiel elekti unu besteton por kunvivadi kun ni. Kion mi devas fari?

Aline ekridetis kaj tuj respondis.

— Bone, unue, kiam oni ne havas besteton hejme, oni devas serioze pripensi antaŭ ol preni katon, hundeton aŭ alian. La unua demando kiun mi faras estas: Ĉu vi vivas sole? Se jes, bone, vi decidus ĉion; sed, se ne, ĉiuj devas ĉeesti por decidi pri la alveno de nova loĝanto hejme.

Kaj por esti pli objektiva, ŝi diris ke ŝia parolado estos nur pri la du plej konataj hejmo-bestoj, la katoj kaj hundoj.



— Bone — ŝi komencis —, la unua paŝo estas studi, esplori antaŭe pri la kutimoj de la dezirata besteto, katoj, hundetoj, kunikloj, ktp., ĉar ili tute malsamas.

— Alia grava demando — ŝi diris —, Ĉu vi loĝas en apartamento? Ĉu en domo, kun korto? Kiom da spaco vi donos al via amiko? Samtempe, gravas scii ankaŭ, kiom da tempo vi havas por zorgi vian hejman besteton.

Parolante pri katoj. Ili estas ludemaj, tre sendependaj, scivolemaj kaj povas esti obstinaj, sed ili estas ankaŭ ekstreme amikaj kaj amemaj. Ĉu vi scias ke ili dormas pli-malpli du tri-onojn de la tagoj, kaj nokte ili estas tre agemaj? Katoj amas salti sur la tablon, meblojn, ktp. Jes, belaj ornamaĵoj povas esti ĵetitaj al la tero kaj rompitaĵoj pro simpla kata amuzo.

Katoj kutime ne ŝatas akvon, ĉar ilia felo ne bone izolas varmon kiam ĝi





estas malseka. Kato, averaĝe, povas vivi ĝis 20 jarojn. Jes, vi devas scii ke pli-malpli dum 20 jaroj ĝi estos kun vi.

Krom katoj, bone, eble vi povas elekti hundeton. Certe, la kunvivado estas tute alia.

Ekzemple, se vi loĝas en apartamento, eliras frue, matene, lasas manĝojn kaj akvon. Revenas nur vespere. Imagu la hundeton sola dum tuta tago. Jes, ĝi suferas tro multe. Tiuj, kiuj havas fortan ligan kun siaj posedantoj, ne povas resti solaj dum la tuta tago. Kial? Bone, la hundido komencas montri signojn de soleco kaj malfortikeco, tio estas konata kiel "apartigita angoro".

Unu el la plej kuriozaj strangaĵoj de hundoj okazas kiam ili iras dormi. Tie oni vidas la kutimon fosi la liton. Per siaj piedoj, la hundidoj faras movojn kvazaŭ ili serĉus ion. Kial, ĝi faras tion? Fakuloj pri bestoj diras ke tio okazas pro instinkto heredita rekte de lupoj.

Vi devas ankaŭ scii ke en la hundaj kondutoj ekzistas la bezono marki teritorion. Kutime tio okazas kiam la hundo promenas kaj, subite, ĝi faras kelkajn haltojn por urini en specifaj lokoj survoje. Vere mi kredas ke ĉiuj, ĉi tie, jam vidis hundojn urini sur foston. Sed ne nur tiel. Specialistoj ankaŭ opinias, ke unu el la manieroj, per kiuj hundidoj limigas la teritorion, estas gratante la lokon per siaj piedoj.

Multajn aliajn ekzemplojn mi povas diri, sed la tempo ne estas tiel granda, mi volas do reliefigi ke oni devas bone esplori la kutimojn de katoj, hundoj, kunikloj, testudoj, kaj aliaj bestoj antaŭ ol preni ilin por kunvivi.

— Sed permesu al mi unu demandon — diris samideano Petro. — Mi jam diversfoje pensis pri tiu afero, havi hundon hejme, sed krom la laboro kaj elspezo, kiom mi gajnos?

— Jes, bona demando. Kostoj ekzistas. La besto bezonas nutrandon, vakcinadon kaj aliajn traktadojn. Sed, ne nur elspezoj ekzistas. La scienco jam studis, kaj pruvis, ke havi dorlotbeston hejme helpas konsiderinde redukti la senton de soleco, kaj malpliigas simptomojn de angoro, streso kaj depresio. Jes, ili influas pozitive la homan mensan sanon.

Mi memoras studojn, kiujn mi legis, ke esploristoj jam konstatis ke eĉ redukti diabeton estas unu el la sanigaj avantaĝoj de posedo de hundo. Per tiu esploro, ili konstatis ke homoj, kiuj regule promenis siajn hundojn, havas unu trionon de la risiko de diabeto kompare kun tiuj, kiuj ne posedas hundon kaj ne faras tion.

Jes, vi certe demandas, kiel la hundoj helpas? Ni povas pensi nur pri la piedirado, kaj ni vidas ke la individuoj, kiuj promenis siajn hundojn, faras ĝis 30 minutojn pli da ekzercado tage ol tiuj, kiuj ne promenis siajn hundojn. Nerekte, hundoj igas nin moviĝi kaj forlasi la sideman vivon.

Ankaŭ la psikologoj diras, ke proksimeco al dorlotbestoj malkaŝas multon pri ni mem. Ili ebligas testi limojn, fantazii interparolojn, helpas nin lerni

spontanee ami. Ili helpas la psikologian ekvilibron de ni ĉiuj. Kiom da homoj miregas antaŭ siaj hejmbestoj sen kompreni kiel, sed klare vidante, ke ili komunikas senvorte, traktas sentojn, komprenas la mondon kaj la sintenojn de ni homoj. Fine, kiam ili estas ĉirkaŭ ni, vere reduktiĝas la streso, favoras kognajn procezojn, koncentriĝon kaj kreivon, kaj ankaŭ ili helpas malsanulojn alfronti malkomfortajn traktadojn.

Jen la resumo de la prelego, miaj karaj. Aline permesis al ni kompreni iom pli pri tiaj belaj amikoj, la hejmaj bestoj, kaj scii kiom bone estas havi almenaŭ unu hejme. Jes, vi jam divenis, mi ankaŭ havas hundeton, kaj mi multege amas ĝin.

**David Bianchini**



# Revoj, vojoj al realeco!

Multaj homoj revas pli bonan mondon. En Esperantujo ankaŭ oni revas plibonigi niajn ĉirkaŭaĵojn. La granda diferenco inter la homoj en la mondo kaj la esperantistoj estas la persistemo de ĉi tiuj lastaj.

Ni trovas la nekredemon en la mondo, koncerne al Esperanto kaj ĝia propono. Sed, malgraŭ la kontraŭuloj, Esperanto marŝas iom post iom, sisteme.

Hodiaŭ la Bienalo de Libroj, en Brazilo, brilas ankaŭ pro la partopreno de stando pri Beletraj Esperantaj Libroj, inkluzive kun lanĉoj de esperantaj libroj. Ankaŭ la radio, tradicia aŭ per interreto, prezentas programojn pri kaj en Esperanto. S-ro Givanildo, en Radio Rio de Janeiro, subtenas, per apogo de Kultura kooperativo de Esperantistoj, programon pri Esperanto, disvastigante muzikon, librojn, novaĵojn pri Esperanta Movado, klarigojn pri Esperanto, jam de multaj jaroj.

Brazila Esperanto-Ligo subtenas la Esperantan Movadon en Brazilo, realigante la Brazilan Kongreson de Esperanto vige kaj konstante.

Eldonejo Lorenz kuraĝe kaj senĉese lanĉadas librojn en kaj pri Esperanto, per mirinda disvastigado de nia lingvo.

La Institucio Legio de Bona Volo disvastigas siajn agojn per Esperanto, klarigante la homojn en diversaj landoj.

Multe da brazilaj verkistoj kaj aktivuloj jam produktis beletrajn librojn: ekzemple, Leopoldo Knodt, Sylla Magalhães Chaves, L.C. Porto Carreiro Neto, Ismael Gomes Braga, Gersi Alfredo Bays, Francisco Valdomiro Lorenz, Gilbert R. Ledon, José Mauro Progiante, Márcia de Castro Soares, Alllan Kardec Afonso Costa, Gilberto Menegasso, José Saraiva Matos, Affonso Borges Gallego Soares, Osvaldo Pires de Holanda, Geraldo Mattos, Alberto



Flores, Vicente Werneck, Paulo Nascentes, David Bianchini, Gilberto Silva Velho, Délio Pereira de Souza, Jair Salles, Julieta Dulce, Josias Barbosa, Francisco S. Wechsler, Antônio Félix da Silva, Fábio Roberto Silva kaj la mirinda verkisto kaj genia tradukisto D-ro Paulo Sérgio Viana, inter aliaj, estas indaj disvastigintoj/antoj de nia amata lingvo Esperanto. Ili riĉigis la Brazilan beletron kaj transdonis al la mondo la konigadon de nia literaturo.

En Esperantujo la revoj ne estas senmovaj, kontraŭe, niaj revoj kreas verkojn, ideojn, movadon, ĝojon, muzikon, kiel en Pouso Alegre, Minas Gerais, S-ano Fábio Roberto Silva kreas projektojn senĉese, ekzemple, la projekton pri kreado de stratŝildoj, sen kostoj al la publika administrado, en du lingvoj: portugala kaj Esperanta. Tiel, li sukcesis pliigi la intereson en sia urbo pri Esperanto kaj pri la kursoj de Esperanto kiujn li subtenas en sia Esperanta Ambasadego!

La internacia Rotaria Movado ankaŭ ekde preskaŭ 6 jaroj ekkonas

Esperanton pro la kreado de aktiva *Rotary-Klubo de Esperanto-Brazilo*, kun asocioj en ok landoj, kunvenante per interreta plataformo ZOOM. Estas 18 rotariaj esperantistoj kiuj faras sociajn projektojn en Afriko. La Kunvenoj kaj komunikadoj estas farataj per Esperanto. Ekde 50 jaroj la geedza paro Grattapaglia (Ursula kaj Giuseppe) jam prezentadis Esperanton en la Internaciaj Rotariaj Konvencioj, ĝis la formado de *Rotary-Klubo de Esperanto-Brazilo* en 2017. Inkluzive, la paro Grattapaglia instruis Esperanton al pli ol 600 infanoj, kiujn ili edukis en mirinda socia agado en la urbo Alto Paraíso de Goiás.

Ĉiam la Esperantistoj kiuj persistadis/as favore al la Esperanta laboro, ne serĉis/as famon, gloron aŭ riĉecon, sed laboris nur kiel laboristoj, kiuj konstruas la vojon al homara demokratia komunikado kaj al universala kulturo. Estas mirinda la klopodoj de tiuj homoj favore al la homaro. Gratulon, karaj gesamideanoj pro via sindediĉo por ni ĉiuj!

**João Otávio Veiga Rodrigues**



# La Horloĝo

Ĉirkaŭ la vivo de homo  
vitroskatoloj troviĝas,  
en kiuj, kvazaŭ en kaĝo,  
besto sidas, maltrankvila.

Ĉu vere kaĝoj, dubinde;  
ili similas al kaĝoj,  
almenaŭ laŭ la grandeco  
kaj laŭ formo de kvadrato.

Iafoje, tiaj kaĝoj  
pende restas sur la muroj;  
kaj aliffoje, private,  
surbrake, aŭ poŝofunde.

Ie ajn ĝi estas: kaĝo  
de virbirdo aŭ birdino:  
flugilbata malkvieto,  
kun saltado enfermita;

temas pri birdo kantema,  
ne nur birdo plumkolora:  
ĉar el ili sonas kanto  
forta kaj daŭre tre longa..




*João Cabral de Mello Neto*  
(1920-1999)

## "La Ondo de Esperanto" relanĉas "Kandidon"

Interesa literatura lanĉo okazis en la internacia Esperantokampo. En januaro 2023, la revuo "La Ondo de Esperanto" lanĉis novan tradukon de la klasika verko "Kandido, aŭ Optimismo", de Voltero. La novan version produktis Sergio Pokrovskij. Fakte, la nova publikaĵo estas revizio kaj reverko de la ankaŭ klasika traduko de Eŭgeno Lanti, publikigita en la jaro 1929. Laŭ komento de Aleksander Konĵenkov, en la retejo de la revuo, "la tro franceca frazosintakso (konscie elektita de Lanti) estas malpezigita kaj rearanĝita laŭ la tradicio Esperanta".

Riĉigas la novan volumon (176-paĝan) postparolo de Pokrovskij, kiu enhavas detalan komparon de la du tradukoj kaj destiniĝas al tiuj, kiujn interesas tradukostudoj.

Volter (1694-1778) estis elstara reprezentanto de la franca Iluminismo,



kaj "Kandido" estas unu el liaj ĉefverkoj. Ĝi estas satira novelo publikigita jam en centoj da lingvoj. Onidire, li verkis ĝin dum tri tagoj, en 1758, sub la impreso de la tertremo okazinta en Lisbono, en 1755. Ĝi rakontas la vivon de junulo, kiu ricevis instruojn pri optimismo,

sed iom post iom seniluziiĝis, kiam li spertis la mondajn malfacilaĵojn.

La nova eldono de la grava libro ne estas aparte aĉetebla. Ĝi estas ekskluzive virtuala suplemento de la revuo, kiun senpage ricevas la abonantoj. "La Ondo" aperas 4-foje en ĉiu jaro, kun dekoj da riĉenhavaj paĝoj pri la movado, infomoj, Esperanta kulturo, literaturo.

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

**(PSV)**



# La Pirata Insulo

“La Pirata Insulo”

Aŭtoro: Julian Modest

Ilustris: Anna Lobo de Carvalho

Eldonejo Libera, 2022

Infanliteraturo estas serioza afero. Oni povas aserti, ke ĉiaspeca literaturo estas eduka, sed infanliteraturo estas aparte grava kiel eduka elemento. Per frua kontakto kun libroj, infanoj ricevas plurajn mensajn riĉigojn. Unue, ili sin distras kaj amuzas; due, ili ampleksigas sian naturan fantazieron, kiu uzas simbolojn por familiariĝo kun la reala, ne ĉiam facila mondo; trie, ili prilaboras per rakontoj siajn timojn, hezitojn kaj dubojn, en kontaktado kun la mondo de plenkreskuloj; kvare, ili lernas novajn vortojn, kiuj respondas al novaj konceptoj, al novaj ideoj; kvine, ili lernas ordigi siajn pensojn en kongrua logika sinsekvo, laŭ la modeloj de la legataj rakontoj; sese, ili interŝanĝas kun siaj gefratoj, geonkloj, geavoj, gepatroj kaj gekolegoj siajn impresojn pri la plenumitaj legaĵoj, kio povas esti interesa reciproka riĉiĝo. Sekve, de frua aĝo gepatroj devas rakonti la tekstojn al siaj infanoj, eĉ antaŭ ol ili lernis mem legi.



Tamen, verki por infanoj ne estas facila afero. Multaj homoj supozas, ke sufiĉas verki en facila lingvo naivan, edifan rakonton. Tute ne! Ĝenerale, infanoj ne ŝatas banalajn, tro naivajn historiojn. Al ili preferas plaĉas sukaj, atentokaptaj, viglaj rakontoj plenaj de surprizoj kaj nekutimaj okazaĵoj. La lingvo ja devas esti sufiĉe facila por la celata publiko, sed ne sukereca kaj sennuanca. Fantaziajn rakontojn oni devas prezenti kvazaŭ ili estus tute realaj kaj verŝajnaj.

Rilate al infanliteraturo en Esperanto, oni povus argumenti, ke la publiko estas tro malgranda. Fakte, ne estas amaso da infanoj, kiuj legas en Esperanto. Sed infanliteraturo estas tiel grava fako en la ĝene-

rala produktado de libroj, ke se ĝi mankus en Esperanto, oni povus ja akuzi, ke Esperanto ne estas vera, vivanta lingvo. Ni memoru, ke Zamenhof elektis inter siaj tradukaĵoj la Fabelojn de Andersen, eble por malfermi vojon. Krome, ni notu, ke denaskaj Esperantoparolantoj ja ekzistas, kaj meritas konsideron. Krome, gepatroj, geonkloj kaj geavoj certe povas legi siajn Esperantolingvajn verkojn al siaj infanoj, tradukante ilin dum la foliumado. Jen facila maniero montri al la etuloj, ke la lingvo ekzistas kaj valoras!

Ĉi tiu (iom longa) enkonduko venis al mi en la kapon, kiam mi legis la verkon “La Pirata Insulo”, de Julian Modest. Ĝi estas bonega ekzemplo. Simpatia eldono, en simple (sed ne banala) lingvo, kiel kutime ĉe tiu fekunda aŭtoro. La papero estas bonkvalita kaj firme eltenos infanajn manojn. La ilustraĵoj estas belaj, interesaj kaj trafaj kiel helpiloj al la teksto. La rakonto estas sufiĉe riĉenhava, tiel ke la komenco ne antaŭvidigas la finon. Temas pri knabo, kiu amegas la maron, vivas apud la maro, kaj decidas aventuri en proksima insulo, kiu havas la famon esti mortige danĝera. Tie li trovas knabinon... Nu, vi devas mem legi la sekvon. Eĉ por plenkreskulo la rakonto enhavas kuriozan vojon al bela fino.

Rekomendinda verko. Gratulon al Eldonejo Libera kaj al la aŭtoroj!

(PSV)

## Rakontaro originale verkita de Paulo S. Viana



# Paca Arto

Esperanto, Aikido, Oomoto. Kiu komuna eco ekzistas inter ili? Kio venas al via kapo kaj menso? Mi ne estas aŭtoritato pri tiuj temoj. Do, mi parolu pri persona sperto rilate ilin. certe, paco aŭ, plibone dirite, aspiro al paco! Kelkaj demandoj nin helpu:



Morihei Ueŝiba

Se mi uzas Esperanton por komuniĝi kun homoj kies gepatra lingvo estas nek la mia nek iliaj, ĉu tio povas venigi pacon, se konsideri, ke la interna ideo de Esperanto estas paco, laŭ Lazaro Zamenhof?

Ĉu la praktikado de Aikido, japan-devena luktarto, povas venigi pacon, se konsideri, ke la esenco de Aikido estas paco, laŭ Ueŝiba Morihei, siatempe disĉiplo de Onisaburo Deguĉi, kunfondinto de Oomoto?

Ĉu el la devizo de Oomoto (“*unu Dio, unu mondo, unu interlingvo*”) povas veni paco, se konsideri, ke Oomoto proponas la uzon de Esperanto, ke ĉe

ĝia sino ekfloris la kulturado de Aikido, laŭ la benoj de majstro Onisaburo Deguĉi? Ĉu pacobatalantoj: Zamenhof, Ueŝiba kaj Deguĉi?

Ĉu Arto kaj Poezio povas ankaŭ venigi pacon al ĉiu homo? Kiel? Sube tri poemoj, kiun mi verkis inspirita de mia praktikado de Aikido:

## Paca Arto

*Aikido. Ĉu arto? Jes.  
Ĉu luktarto? Multege plu!  
Al oponento  
mi ne min oponas,  
novan vojon proponas:  
reveno al pacoflu'!*

Zamenhof publikigis eseon nome “*Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*”, defendante la ecojn de Esperanto por la rolo de internacia komunikilo, post analizo de diversaj tiamaj lingvoprojektoj. Sed pli grave ol tio, proponis filozofion nome

Hom.ar.an.ism.o.n. Tiu vorto konsistas el radiko *homo* (individuo) kaj sufiksoj *-aro* (kolekto), *-ano* (membro) kaj *-ismo* (filozofio). Tiel ‘homarano’ estas individuo, kiu sentas sin membro de la tuta homaro, sen ajna distingo. Zamenhof mem taksis tiun pacan filozofion pli grava ol la Lingvo Internacia Esperanto mem, kiam li asertis, ke se ekzistus pli bona propono ol Esperanto kiel tutmonda interlingvo, li mem tuj forlasus Esperanton kaj subtenus alian lingvopropozonon. Tamen, neniu alia planlingvo sin montris pli bona kaj pli taŭga por tiu rolo ol Esperanto.

El “*Esperanta Proverbaro*” jen du elokventaj proverboj:

- *Konsento konstruas, malpaco detruas.*
- *Per pacienco venas scienco.*

En “*Arto de Paco*”, Morihei Ueŝiba asertas:

*Ĉia vivo estas la manifestiĝo de spirito, la manifestiĝo de amo. Kaj Arto de Paco [Aikido] estas la plej pura formo de tiu principo. Militanto havas kiel mision haltigi ĉiujn disputojn kaj luktojn. Universala amo funkcias diversmaniere: ĉiu manifestiĝo devas plene esprimiĝi. Arto de Paco estas la vera demokratio.*

*Arto de Paco estas la principo de nerezisto. Ĉar ĝi estas nerezisto, ĝi estas venkanta ekde la komenco. Tiuj homoj plenaj je malbonaj intencoj kaj malbonaj pensoj estas tuj venkitaj. Arto de Paco estas nevenkebla ĉar ĝi kontraŭbatalas nenion.*

Aŭspicie de Oomoto, de la 3-a ĝis la 15-a de junio 2015, mi vizitis la sidejojn de Oomoto en Kameoka kaj Ajabe. Tie multege impresis min, interalie, la korpa kaj spirita silenta sinteno de japanaj oomotanoj dum preĝoj kaj meditado en templaj ceremonioj. Sendepende de aĝo, surgenue, erekte, elegante kaj senmove ili sidadis dum horoj, serenaj vizaĝoj esprimantaj pacon.

*Daŭrigota sekvapaĝe*





Fine, du poemoj.

### Aikidume I

*mia kolo, via bato  
oblikva frapo  
antaŭeniro kaj turniĝo  
kiel akso piedo  
ŝtelita via ekvilibro:  
falo ebria*

— *kaj fine,  
reekvilibro harmonia*

### Aikidume II

*ventra pugnobato*

*la malplenon tuŝas  
dors-kurbigo sabla  
al vi donacata:  
via pugno supren  
via korpo falas  
viabrake spertata tordeto*

— *niakore paco revenas*

**Paulo P Nascentes**

(Profesoro, poeto, artoterapeŭto)



<https://easp.org.br/libroservo>



Alvaro Moreyra

# Gaŭĉa Literaturo

*Teksto de la gaŭĉa aŭtoro Alvaro Moreyra (1888—1964),  
esperantigita de Rita de Moraes.*

Estis foje du homoj, kiuj alcelante samloken, ekiris vojaĝe sur la sama vojo. Unu, malgaja, fikse rigardis ĉiam antaŭen. Ĉio ĉirkaŭe ŝajnis al li indiferenta. La alia ĉiumomente haltis. Proksime al fontano, al florejo, al ombrejo. Lasis sian korpon fali apud la fontanon, aŭskultante... La okuloj kuŝigis en lian animon ĝian bildon... eniris en lian memoron tiu kvazaŭ homa voĉo... Kiam alvenis la nokto li endormiĝadis. Kiam la lumo ekvekiĝis, li ekvekiĝis kune kaj plu iradis. Tuj denove haltis. Tiel li daŭris ĝis, en malvarma posttagmezo, li sukcesis piedpremi la grundon de malproksima lando. Ĉe strata angulo li renkontis lacekonsumitan viron, kiu rigardis lin dum kelka tempo, alproksimiĝis kaj demandis:

— Ĉu vi ne rekonas min?

— Ne. Mi ĵus alvenis de fora lando. Mi konas neniun ĉi tie.

— Ĉu vi ĵus alvenis?! Sed ni eliris

samtempe el nia vilaĝo. Mi alvenis antaŭ longaj jaroj. Vi venis malrapide... Vi tiom sangiĝis. Tamen, vi ŝajnas kontenta, plena de feliĉo.

— Ah! Belegan vojaĝon ni faris! Ĉu vi ne memoras?

— Mi ne memoras...

— Estis sangkoloraj matenkrepuskoj, kiuj enigis en la karnon novan forton. Vintraj tagmezoj komfortvarmigaj. Bluaj noktoj, en kiuj la silento estis tiel granda, ke la pensoj sin tuŝis ne eligataj de la buŝoj, eĉ balbute. Ĉu vi ne memoras?

— Nenion mi vidis... Mi memoras nur la adiaŭan horon... kaj ke mi rapidis por alveni...

— Aŭdu: mi sentas interne sopiron pri ĉio. Ĉion mi memoras, kiel se mi ĉion resentus... Ĉar mi multe observis, multe mi povas bildigi al mi.

Kaj li ĉion rememoris.

# Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler

## Demando

Akuzativo post *kiel* foje konfuzas Esperantistajn mensojn. En infanlibro de fama aŭtoro oni trovas la jenan frazon:

*Li, bela kaj forta junulo, havis nigrajn okulojn kiel karbon, krispan hararon, densan kiel peĉon.*

Ĉu la frazo estas ĝusta? Kial?



Francisco S. Wechsler

## Respondo

Tiu frazo, laŭ pure sintaksa vidpunkto, ne estas malĝusta, tamen ĝi ne taŭge esprimas, kion la aŭtoro celis diri. Ĝi efektive esprimas la **manieron**, laŭ kiu la junulo havis okulojn kaj hararon, alivorte: *la bela kaj forta junulo havis nigrajn okulojn samkiel oni havas karbon, kaj havis krispan kaj densan hararon samkiel oni havas peĉon*. La aŭtoro evidente ne tion ĉi celis diri.

La taŭga formo devus esprimi **komparon** inter la okuloj kaj karbo, kaj

inter la hararo kaj peĉo: *Li, bela kaj forta junulo, havis nigrajn okulojn [tiajn] kiel karbo [estas], [li havis] krispan hararon, [tiel] densan kiel peĉo [estas]*. La interkrampaj partoj ordinare estas forigeblaj, tamen ili helpas klarigi, kial certaj vortoj devas ricevi la N-finaĵon, dum aliaj ne. Ĉiam, kiam en dubo pri tiaspecaj frazoj, oni povas kaj devas kompletigi ilin per forigeblaj partoj por decidi, kie uzi la N-finaĵon.

Jen pliaj Zamenhof-aj ekzemploj pri komparo:

[...] antaŭ ŝi staris la aminda juna reĝido, kiu direktis sur ŝin siajn okulojn nigrajn **kiel** karbo [...] (Fabeloj de Andersen 1)

La virineto de maro vidis, ke ŝi havas korpon tian **kiel** ili [...] (Fabeloj de Andersen 1)

[...] viandon li donas al mi tiel malmolan **kiel** trabo [...] (La Revizoro)

[...] unu el ili havis tranĉilon en la mano, grandan kaj akran **kiel** tiu, per kiu la knabino detranĉis la tulipojn. (Fabeloj de Andersen 1)

Ĝi havis belajn bluajn floraĵojn, molajn **kiel** flugiloj de tineoj kaj ankoraŭ multe pli delikatajn. (Fabeloj de Andersen 3).

La du bluaj okuloj [...] kaŝis en si trezorojn, [...] riĉajn **kiel** ĉiuj belegaĵoj de Romo [...] (Fabeloj de Andersen 4)

[...] li posedis du okulojn klarajn kaj helajn **kiel** profunda akvo. (Fabeloj de Andersen 4)

Kaj jen kvar pliaj ekzemploj Zamenhof-aj pri **maniero**:

[...] tie sidis la belega virino de la somero, la sama, kiun ni jam vidis antaŭe **kiel** infanon kaj kiel fianĉinon. (Fabeloj de Andersen 3).

En tiu momento aperis la tria frato, – ĉar estis tri da ili, sed neniu kalkulis la trian kiel fraton [...] (Fabeloj de Andersen 3)

Kaj Laban donis sian sklavinon Zilpa al Lea **kiel** sklavinon. (Malnova Testamento)

Kaj el la manoj de alilandulo ne alportu tiajn **kiel** panon de via Dio [...] (Malnova Testamento)

## La Rigamontoj

"...ĉarma libreto por progresantoj, kiu ne estas nur didaktika, sed sentoplena: sprita, simpla, rektastila, sen komplikaj ornamoj, aŭtentika en la priskribado de homfiguroj kaj situacioj, en maniero delikata kaj viveca."

Paulo S. Viana

Tradukis: Gilberto Menegasso, Eduardo Bessa

Eldonis: EASP, 2021

[easp.org.br/libroservo](http://easp.org.br/libroservo)



Gilberto Menegasso  
la aŭtoro

